Pupkapo el „Plastiform“

Ĝenerale

Unue vi decidu: ĉu vi volas konstrui pupon kun fortaj esprimoj por ludi antaŭ publiko, aŭ ĉu estu pupo por rigardi ĝin kiel „belaspekta“ objekto.
„Belaspekta“ pupo kompreneble povas taŭgi por ludi antaŭ malgranda publiko, eĉ antaŭ granda publiko, se vi argumentas, ke tio, kion la rigardantoj ne povas vidi pro tro granda distanco ili kompensu per sia imagpovo.
La sekva pripenskolektado utilas por orientiĝi.

Kien lokigi frunton, okulojn, nazon, buŝon, orelojn...

Ĝenerale helpas, se vi foje observas vizaĝojn – aŭ – se momente ne eblas, rigardi la vian en speguloj (minimume estu du, por ankaŭ havi videblecon al via profilo/malantaŭa parto). Kie troviĝas kio? Se homoj sen antaŭsperto pentras vizaĝon, ili preskaŭ ĉiam „gluas“ la okulojn en la frunton – se entute ili desegnas frunton. La frunto tamen okupas grandan parton de nia vizaĝo. Provu per la mano kiom da... Kion opinias vi: ĉu estas proporcia diferenco, ĉu temas pri juna/maljuna frunto?
Kien kun la oreloj? Provu, kiom da spaco estas inter okulo kaj orelo – metu vian vertikale montrantan manon inter okulo kaj orelo. Ĉu surprizita? Kaj kiom da spaco estas inter la orelo kaj la supra fino de la kranio? Imagu, kion signifas tiu malkovro: homoj kutime havas enorme larĝan profilon. Tio estas granda avantaĝo. Sed tiuj konsiloj celas nur por orientiĝi. Kompreneble povas esti tute interesa pupo, se vi vole metas ekzemple la buŝon tien kie kutime estas la okuloj kaj inverse – do ne timu, ke ekzistas striktaj reguloj.

La profilo

Ofte figuroj videblas en profilo (ekzemple en dialogo, marŝante...). Pro tio tre gravas, ke oni konstruu pupon, kies profilo donas sufiĉe da informoj al la publiko.
Tio signifas, ke ĉio, kio situas aŭ dekstre aŭ maldekstre de la fronta meza linio devas esti lokita pli malantaŭen.

	- Por teatra pupo ni ŝovu la nazon (laŭ tipo eventuale ankaŭ la buŝon / la mentonon) pli antaŭen kiel ĉe kutima vizaĝo. Ju pli antaŭen, des pli klare la spektantoj povas distingi la diversajn tipojn. - La oreloj situas pli malantaŭ la „meza linio“ (vidu la skizon).	

Ina aŭ vira

	- Ne ĉiam estas facile, distingi inter inaj kaj viraj kapoj (komparu ekzemple la du bildojn). - Ĝenerale inaj vizaĝoj havas pli molajn kaj fajnajn trajtojn, la nazo estas pli malgranda - La lipoj ĉe virinoj kutime estas pli ŝvelintaj. - Viroj havas pli eĝoformajn kaj larĝajn mentonojn.	

Juna kapo

	- ronda vizaĝo - preskaŭ sensulka - la distanco inter la okuloj kaj la buŝo estas malgranda - la okuloj troviĝas iom pli sub la meza kaplinio - la lipoj leviĝas pli antaŭen kompare al maljunuloj - etaj oreloj, kiuj troviĝas sur la nivelo inter okuloj kaj iom super la buŝo.	

Maljuna kapo

	- longa vizaĝo - multaj sulkoj - la distanco inter la okuloj kaj la buŝo estas granda - la okuloj troviĝas iom pli alte ol la meza kaplinio - se oni rigardas la pupon en la profilo, - la lipoj (se sendentaj) preskaŭ ne elstaras - Kio daŭre kreskas ĉe plenkreskuloj? Ĝuste: la oreloj. Ju pli maljuna la homo, des pli grandaj kaj longaj la oreloj.	

Kiel konstrui pupokapojn el „Plastiform“

Kompreneble ekzistas multaj eblecoj. Sekve mi montras nur unu metodon.

Materialo

- „Plastiform“ (ligneroj, fajnaj kiel faruno kaj glumaterialo)
- diversaj modlaj bastonetoj
- konusformaj tuboj, trančitaj el tuboj de necesejpapero
- kuireja papero
- tondilo
- glubendo
- nigraj okuloj el duonkugloformaj vitraj perloj (vi ricevas ilin en manlaborvendejoj)
- botelo kun sablo aŭ ŝtonetoj kaj bastono kiel tenilo por la kapo (diametro de ĉirkaŭ 1 cm, longeco ĉirkaŭ 10 cm pli longa ol la alteco de la botelo)
- pinĉilo por poste depreni la paperon el la kapo
- akvofarboj
- molaj kaj malmolaj penikoj en diversaj grandecoj
- akvujo
- haroj (ekzemple felo, lano)
- ŝtofoj por la korpo (la produktmaniero de la vestaĵoj en tiu ĉi manuskripto ne estas priskribita)

La pasto

Preparu la paston laŭ la priskribo sur la plasta sako.
Lasu ĝin poste ŝveli dum minimume 30 minutoj (pli bone dum unu tago).

La tubo

	- TrančU el tubo de necesejpapero du pecojn. TrančU iom oblikve – rigardu la bildojn - kungluu unu el la du partoj al iom konusforma cilindro	

Kruda kapformo el kuireja papero

El kuireja papero vi faru bulon. Por malgranda kapo vi uzu ĉirkaŭ 3, por granda kapo ĉirkaŭ 5 paperoj. La cilindron enŝovu en la bulon tiel, ke la mallarĝa parto estas en la bulo. Ĝi servas poste kiel kolo. Unu paperon vi ĉirkaŭvolvu laŭ la bildo kaj kungluu ĝin per glubendoj kaj fiksu ankaŭ la kolon. Tie kie poste troviĝas la nazo kaj la mentono (se estu elstara mentono) vi algluu ankoraŭ unu/du paperojn. Malsekigu iomete la kuirejan paperon.

				

La detala preparado

Knedu el la pasto mangrandan „patokukon“ kaj ĉirkaŭu per ĝi la kapon de supre malsupren. Eble vi bezonas ankoraŭ iom da pasto por la suba kapparto kaj la kolo. Ĉiam se vi aldonas paston uzu kiel gluilo iom da akvo kaj bone ŝmiru la fendojn.
Decidu kie troviĝu la okuloj kaj premu per ambaŭ dikingroj samtempe sufiĉe profundajn kavojn. La okulkavoj estas la plej profunda parto de homa kapo. Por la nazo, okuloj, oreloj, vangoj, frunto, mentono kaj makzeloj ĉiam aldonu novan paston. Krome eventuale brovojn kaj palpebrojn. La orelojn preparu samtempe kaj simetrie kun ambaŭ manoj.
Por la pli fajnaj trajtoj helpas uzi la modlajn bastonetojn. Metu la vitrajn okulojn en la kavojn.
La sekiĝo daŭras laŭ grandeco du ĝis tri tagoj. Por pli rapidigi la sekiĝon, metu la kapon dum duona tago en fornon, kiun vi ŝaltas je ĉirkaŭ 50 – 60 °.
Kiam la pupo de ekstere estas tute seka, vi povas eltiri la enan paperon per pinĉilo. Malsekigu la enan parton de la kolo per akvo kaj malpligrandigu la truon per tiom da pasto ĝis kiam la kaptenanta fingro nur eniras ĝis la unua artiko. Tiam la movkapablo estas maksimuma.

	Se vi uzas la mezan fingron por teni la kapon, vi havas por via montrofingro kaj ringfingro la eblecon fari kavojn dekstre kaj maldekstre de la kolo (vidu la bildon). Tiuj du fingroj helpas ne nur por pli bone teni la kapon sed ankaŭ ebligas fajnajn kapturnojn.	

Kiel kolorigi pupojn

La lumo kutime venas de supre (ekzemple la suno). Por subteni la naturan ombran efikon, profesiaj pupfaristoj metas helajn kolorojn al ĉiuj supre direktitaj partoj de la vizaĝo. Inverse malhelaj koloroj estu en la ombraj regionoj. Se vi vortvorte sekvas tiun postulon, via pupo ricevas akrajn konturojn. Tio estas granda avantaĝo por bone distingi la trajtojn, eĉ se vi rigardas la pupon de granda distanco.
Unue malsekigu la pupkapon.
Por homa haŭtkoloro miksu cinabron (pli por junaj kapoj), karminon (taŭgas pli por maljunuloj), flavan, iom da verda kaj ege malmulte da blua koloro. Cetere: La haŭtkoloro, kiu ofte troviĝas en farbokestoj ne vere taŭgas.

Kelkaj vizaĝesprimoj

Ĉu estas simpla ordigi la ecojn al la bildoj? Estas pli da ecoj ol bildoj... Provu!

furioza, ebria, malica, fripona, naŭzita, naiva, timema, terurita, malsprita, gaja



Kopirajto
La kopirajton de la tekstoj kaj dezajno posedas Christoph Frank. Sen permeso de la kopirajt-posedanto ne eblas multobligado - ankaŭ ne de partoj aŭ aliaj publigaĵoj de la enhavo.